BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

| CGC Nº 00406 504/1000-06 | PRESIDÊNCIA<br>Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73<br>Telefone 4-8033<br>11.100 – Santos (SP) | SECRETARIA<br>Caixa Postal 07 – 1182<br>Telefone 42-9090<br>70.000 – Brasília (DF) |
|---|---|---|

BOLETIM Nº 32 JANº/FEVº DE 1978. ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

Redação: MARIA ALMADA

## I–a LATINAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Kiel ni jam anoncis en antaŭa numero de nia Bulteno, la I–a Latinamerika Kongreso de Esperanto okazos en Marilia (SP), de la 17-a ĝis la 22-a de julio ĉijare.

Por ke ĝi iĝu granda kaj bona antaŭpropagando de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Brazilio en la jaro 1981-a, ni tuj devas kunigi niajn fortojn kaj eklabori amase.

La estrarino de UEA por Latinameriko, s-ino Ursula Grattapaglia, jam finis sian unuan taskon rilate la movadon en nia lando kaj en tuta Latinameriko.

Ŝi vizitis, laŭ la informo de nia vicprezidanto kaj ĉefdelegito de UEA, s-ano Inĝeniero Giuseppe Grattapaglia, ŝia edzo, landojn en Sud-Ameriko kun bonega rezultato. Ŝi varbis por Latinamerika Kongreso partoprenontojn el Argentino, Ĉilio, Peruo, Bolivio, Ekvadoro kaj Kolombio, dank'al sia altnivela kapablo. En Lima (Peruo), ŝi estis intervjuita en la ŝtata televido dum 14 minutoj kun granda sukceso. Post ŝia vizito la movado en la Latinameriko plifortiĝas, ĉar estas planitaj Esperanto-kursoj en la fakultatoj de Bolivio kaj Ekvadoro.

En Brazilo jam en diversaj fakultatoj ankaŭ estas planitaj Esperanto-kursoj. Post ŝia ekskurso tra la Latinameriko, ŝi vizitis Eŭropon partopreninte junularan seminarion en Rotenburg (Germanio). Fine, ŝi estis en Rotterdamo, Nederlando, kaj raportis al UEA pri ŝia laboro kaj spertoj.

Por garantii la sukceson de la Latinamerika Kongreso de Esperanto en Marilia, UEA decidis subteni du karavanojn: unu el Usono kaj alian el Eŭropo. Eblas, ke nia kongreso iĝu impona kaj elstara.

Ke la jaro 1978-a komenciĝas bone estas nekontesteble. Nun dependas de nia anaro por ke ĝi finiĝu laŭeble pli bone. Pro tio ni ĉiuj klopodu igi tiun gravan unuan kongreson regionan la plej grandioza.

La aliĝkotizoj ĝis la 30-a de aprilo estas Cr$ 200,00 (ducent kruzejroj); post tiu dato, Cr$ 300,00 (tricent kruzejroj). La junularo kaj akompanantoj pagas 50% malpli. Aliĝu ni amase!

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

## "A LINGUAGEM DOS ANIMAIS"

Nia vicprezidantino Yolanda de Araújo Costa, sendis al ni ekzempleron de la libro "A Linguagem dos animais", de Florence Barker, Anglujo, kiun ŝi tradukis portugalen el Esperanto. Temas pri tre interesa verko, kiun ni rekomendas al niaj legantoj. Ni el tuta koro dankas al nia samideanino la afablecon.

## SPIRITA ELDONA SOCIETO "F. W. LORENZ"

Nova estraro elektita por la periodo 15/12/77 ĝis 15/12/79: Direktoro Superintendanto: Nelson Afonso; Direktoro Administranto: Delio Pereira de Souza, kaj Direktoro Financisto: Affonso Borges Gallego Soares. Laŭ la komuniko Nº 8, de la 31-12-77, jen la Bilanceto pri la Jaro 1977-a:

| ENSPEZO: | Cr$ |
|---|---|
| Antaŭjara saldo | 106,80 |
| Kotizoj | 13.257,71 |
| Kotizoj por 1978 | 3.131,39 |
| Donacoj | 24.275,50 |
| | 40.771,40 |

| ELSPEZO: | Cr$ |
|---|---|
| Eldonotaj libroj | 21.000,00 |
| Aĉetitaj libroj | 9.202,00 |
| Poŝtmarkoj | 2.374,20 |
| Cirkuleroj | 330,00 |
| Paperaĵoj | 481,70 |
| Saldo por la venonta jaro | 7.383,50 |
| | 40.771,40 |

---------------xxxxxxxxxxxxxxx---------------xxxxxxxxxxxxxxx---------------

### NI KONDOLENCAS

Mortis subite en Valencia (Hispanujo), post kelkhora malsano, en la 28-a de novembro 1977, nia karega amiko D-ro Rafael Herrero Arroyo, kiu multe helpis nin okaze da la 53-a Universala Kongreso de Esperanto, en Madrido. Ni sincere bedaŭras la forpason de tiu samideano kaj amiko. Al liaj familianoj ni kondolencas.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

### VIRINOJ EN NIA MOVADO II

Kiel eĥo de nia artikolo aperinta en nia Bulteno 31, venis sciigo el Recife(PE), de S-ano Amaro Pinangé Soares, nia vicprezidanto, informante nin pri la agado de la s-ino Lenilda de Lima Sobreira, edzino de la nuna prezidanto de la Pernambuka Esperanto-Asocio, S-ro Ruy Caneca Sobreira, kaj Ĝenerala Sekretariino de la Asocio, kiu multe helpas la movadon.

Meritas laŭdojn ankaŭ s-ino Maria José Fontes, kasistino de la Asocio, kiu ankaŭ senlace kunlaboras por la bono de la organizaĵo. Ni dankas al S-ano Pinangé.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

### GRATULOJN AL SAN-PAŬLO ESPERANTO-ASOCIO

De la 1-a Sekretario de la Leĝodonanta Assembleo de São Paulo, deputito Jorge Fernandes da Silva, nia prezidanto ricevis komunikon pri la enskribo en la Protokolon de tiu Assembleo, de propono de la deputito Osiro Silveira, sub nº 3.028, de 1977, laŭ kiu estis registrita voĉo je gratulo al San-Paulo Esperanto-Asocio kaj Bauru Esperanto-Societo pro la realigo de la Unua Regiona Renkontiĝo de Esperanto de Ŝtato de São Paulo, okazinta en la 3-a kaj 4-a de decembro pasinta.

La proponinto petis ankaŭ ke oni sciigu la jenajn personojn pri la afero:

Prof-ino Elvira Fontes, prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, São Paulo; Prof-ro Euclydes Giraldes, prezidanto de Bauru Esperanto-Societo, Bauru; kaj Prof-ro Francisco de Souza Almada, prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Kiel pravigo la deputito sciigis pri tio, ke la urbestrejo de Bauru apogis la renkontiĝon de la du organizaĵoj – San-Paulo Esperanto-Asocio kaj Barua Esperanto-Societo. Temis pri kultura renkontiĝo promociita de la esperanta movado, kiu celas disvastigi kaj diskonigi la lingvon internacian Esperanto, gravan komunikilon inter la popoloj, forigante la barojn altruditajn de la lingva diverseco. Do tre pravigebla la omaĝo!

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

### DISDONADO DE DIPLOMOJ

O Serviço de Informação de ESPA,

sito na Galeria di Primio Beck, conj. 1 e 4P/A, de Porto Alegre, informa-nos:

Realizou-se no dia 21/12/77 na sede da Fraternidade E. Cavaleiros de S. Jorge, a cerimônia solene de diplomação no curso elementar de Esperanto, da 1-a turma do Departamento Cultural daquela entidade, composta dos finalistas seguintes: Alzira dos Santos Serafim, Amélia Carvalho Atti, Ana Maria Sefrin Feijó (oradora), Cleonice Mendes Delgado, Dionéia Fagundes Zanotta, Dolores Teresinha Rodrigues, Fernando Antonio S. Alencastro, Luci de Lima Maia, Malvina dos Santos Serafim, Maria de Lourdes Guimarães, Paulo Ricardo G. Pedroso, Ruth Aurea Adams Coelho e Suzana Maria Ilha Malmaceda.

A sessão foi prestigiada pelo presidente e o vice-presidente da Esperantista Societo de Porto Alegre; por representantes esperantistas e da Academia Riograndense de Letras; por alta autoridade judicial e professores. A turma foi preparada pelo professor Weldom Machado Malmaceda, sendo paraninfo o Dr. M. Belmonte de Abreu, encerrando-se a sessão com cantos ao violão, recebendo o professor do curso um cartão de prata dos formandos.

Felicitamos os novos esperantistas, sugerindo-lhes eficaz trabalho no sentido de não abandonarem a missão ora abraçada, qual seja a de propagar o uso do Esperanto.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

## NOVA VICPREZIDANTO

La 7-an de januaro pasinta estis nomumita nia vicprezidanto por la fako TURISMO, la samideano Prof-ro Raymundo José Pitanga Rocha, el Salvador (BA). Dum la forpermeso de nia kara samideano José Saraiva Matos, li plenumos ambaŭ taskojn.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

## INFORMOJ EL SALVADOR (BA)

Nia vicprezidanto Raymundo José Pitanga Rocha, sciigas nin pri la jeno:

1) Como ocorre em anos anteriores, no dia 13 de dezembro passado houve a premiação dos professores. Foi conferido também o título de "Professor do Ano" ao professor Raimundo Pitanga. Na oportunidade foi sugerida a inserção de um ato de louvor ao Prof. José Saraiva Matos na ata da próxima reunião de Diretoria.

2) Estrearam com grande sucesso no mês passado o coral e o grupo de teatro da Associação Bahiana de Esperanto que é dirigida pelo Prof. Jackson Galvão. Na mesma ocasião houve a ceia de Natal dos esperantistas bahianos.

3) Está sendo providenciada a organização de novas turmas para que, logo no início do ano, em obediência ao convênio com a Secretaria de Educação e Cultura do nosso Estado, comecem as atividades vespertinas e continuem as noturnas.

4) Foi fundado no mês de novembro próximo passado o "Alagoinhas Esperanto-Klubo" da cidade de Alagoinhas, por Lucymar Magalhães Nunes e já conta com 17 alunos.

5) Já estão em andamento os trabalhos para o lançamento do órgão oficial da Associação Bahiana de Esperanto, o "Bahia Esperantisto", que deverá circular trimestralmente".

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

**BELO HORIZONTE (MG)** – Nia vicprezidanto Ismail Barbosa Teixeira, eklaboras sciigante nin pri la disdonado de atestoj rilataj al elementa kaj Daŭriga Kursoj de Esperanto okazintaj en Belo Horizonte:

"Esperanto-Instituto pri Klerigado, la 21-an de decembro 1977 disdonis atestojn pri Elementa kaj Daŭriga Kursoj de Esperanto al gelernantoj, kiuj sukcesis en la kursfinaj ekzamenoj. Ricevis po du atestoj, unu pri la Elementa, alia pri la Daŭriga Kurso, ses(6) gelernantoj, nome: Ana Paula de Souza Valentim, Gustavo Bermudez Sequeira, Jorge Agnelo da Cruz, José da Silva Pereira, Mozar Alves de Andrade kaj Paulo Roberto dos Santos. Ateston pri la Elementa Kurso ricevis s-ino Nícia de Mattos Borges. Kursgvidintoj:– Ismail Barbosa

Teixeira kaj Said Pontes de Alburqueque.! Ni gratulas la novajn esperantistojn kaj la kursgvidintojn. Antaŭen!

--------xxxxxxxx-------xxxxxxxx-------

**S-ANO JOSÉ DIAS PINTO** – Nia vicprezidanto Dias Pinto estas unu el niaj plej klopodemaj kunlaborantoj. Li vere estas ĝisosta esperantisto. Lastatempe li direktas ka Kulturkunvenon en San-Paŭlo Esperanto-Asocio kun sukceso, enkondukante aktualajn temojn. Li envenis Brazilon el Portugalio. Jam en sia infanaĝo li ekŝatis Esperanton. Ne havante instruiston li iĝis memlernanto, sed ellernis la lingvon ĉar li havis memvolon.

En Brazilo li edziĝis kun s-ino Amelia, kiu vidinte ke sia edzo ŝatas Esperanton, ankaŭ lernis ĝin. Iliaj gefiloj Mariza kaj Alvaro estas denaskaj esperantistoj. En la familio S-ano Dias Pinto plej volonte parolas esperante.

Aliĝinte al San-Paŭlo Esperanto-Asocio, li ĉiam agadis vigle, kiel sekretario; poste, kiel redaktoro de "La Lampiro", informilo, kiu dum pluraj jaroj aperadis kun sukceso. Intertempe li faris propagandon pri la internacia lingvo ĉe Rotary Klubo en Santo André (SP), kie li loĝas.

Li multe helpis por la aĉetado de la sidejo de la San-Paŭlo Esperanto-Asocio, morale kaj materiale.

Kiel nia vicprezidanto li ĉiam pretas helpi la agadon de BKE, apogante nin ĉiamaniere.

Lia perfekta esperanta scipovo estas konata. Lian sindonan kaj amikan sintenon ĉiuj alte taksas kaj admiras. Pro tiom da bonaj agoj kaj personaj valoroj nia redaktorino foje verkis la jenajn versojn okaze de omaĝo al lia persono:

"Deziri ne esta honto,
estu ĉiam anto, onto,
nur neniam iĝu into,
nia kara Dias Pinto!

--------xxxxxxxx-------xxxxxxxx-------

**JUNULARA ANGULO**

Okaze de la 12-a Seminario de Esperanto en Santos (SP), ni plezure konstatis, ke nia junularo ĉiam pli kaj pli aktivas.

La eventon ĉeestis grupoj el la tuta lando. La interkompreniĝo estis en esperanta lingvo.

Krom la elekto de la "Fraŭlino Esperanto", estis konkurso pri muziko kun disdonado de premioj kaj laŭdoj. La nombro de la junularo kontentige kreskas.

Ĉijare okazis la unua renkontiĝo de la junularo en Niteroi (RJ), kiun ĉeestis 70 gejunuloj el 11 urboj. Estis pluraj prelegoj kaj inter la prelegintoj elstariĝis "Fraŭlino Esperanto" – f-ino Heliana Lucia da Cruz Corrêa, kiu disertis pri akvopurigado en la urboj. Krome okazis ankaŭ ĉampioneco pri piedpilkludado.

La venonta renkontiĝo estos en Gojanio (GO), en 1979.

La prezidanto de BEJO, s-ano Ciro G. Freitas informas, ke oni organizis teatran grupon, kiu jam prezentiĝis en Barra do Garças (MT) kaj Gojanio en TV, kun sukceso.

La grupo: Brazila Teatro-Esperanto-Grupo – BRATEG intencas prezenti teatraĵon okaze de la Latinamerika Kongreso de Esperanto en Marilia sub la titolo "A Derradeira Ceia", de Luiz Marinho.

La grupo intencas havigi ŝtatan subvencion.

Intertempe s-ano Ciro Freitas preparas la grupon, instruante Esperanton al ĝiaj membroj por ke la teatraĵo havu sukceson.

Estas laŭdinda lia laboro kaj de aliaj kunlaborantoj, kiuj organizas similajn grupojn.

Nia juna pianisto André Luiz, kiu senĉese agadas, estis la organizinto de la muzikfestivalo kaj de la renkontiĝo en Niteroi. Gratulon! Bonŝancon al vi ĉiuj!

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx-------

**SEMAJNO DE LA INTERNACIA AMIKECO**

San-Paŭlo Esperanto-Asocio intencas festi la Semajnon de la Internacia Amikeco kiu okazos de la 19a ĝis la 25-a de februaro ĉijare.

Konsidere al ĝi estas aranĝata konkurso pri literaturo sur la temo "A Amizade não tem fronteiras" kun la jena regularo:

1) – La kandidatoj dividiĝas en du aĝajn kategoriojn:

A – De 10 ĝis 15 jaroj.

B – Depost 16 jaroj.

2) – La laboroj devas esti portugallingve kaj tajpitaj sub spaco 2,havante minimume 50 liniojn kaj la plej multe kun 100 linioj.

3) – Estos akceptataj poeziaĵoj kun minimume 20 versoj.

4) – La kandidatoj uzu pseŭdonimon, metante en koverton sian veran nomon.

5) – Povos konkursi ĉiuj brazilanoj, ĉu esperantista aŭ ne.

6) – Oni ne povas utiligi frazojn aliulajn, kio povos nuligi la ekzamenon.

7) – La 1o-an de marto estos la lasta tago por liveri la laborojn.

8) Oni sendu la laborojn al San-Paŭlo Esperanto-Asocio – Av. S. João, 1333 – apto.21 – 2º CEP 01.055 - São Paulo (SP).

9) – La librejo Esperanto Ltd. donacos belan librokolekton al tiuj, kiuj prezentos la plej bonajn laborojn, laŭ la aĝa kategorio.

10) – La 19-an de marto nia bulteno publikigos la rzultaton de tiu konkurso. Oni ne forgesu, ke la Librovendejo Esperanto, havas la lernolibron de nia Prezidanto – Esperanto Elementar, kiu faciligas la lernadon de la lingvo.

## INTERVJUO

Afable invititaj de Radio-Klubo de Santos, nia prezidanto F. S. Almada kaj edzino, Maria Almada, entis intervjuitaj de S-ro Gabrielo Gabrieleschi, de tiu radistacio dum 30 minutoj, kiam estis pritraktita la Latinamerika Kongreso de Esperanto, okazonta en Marilia (SP), de la 17-a ĩs la 22-a de julio ĉijare.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

## LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Ocorreu a 28 de janeiro último a posse da nova diretoria da Liga Brasileira de Esperanto, presidida pelo Prof. Silla M. Chaves.

Auguramos à nova direção da Liga toda sorte de felicidade e progresso no decorrer de seu mandato.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

## LIVRARIA "PINGO DE LUZ"

Encontram-se nesta Livraria, além de outras, obras sobre o Espiritismo, como: **Em Esperanto:** – La Libro de la Spiritoj, La Turmentego de la Memmortigintoj, Sur la Vojo de la Lumo, Ago kaj Reago, Enkonduko de la Spiritisma Doktrino, Nia Hejmo, La Libro de la Mediumoj, Mediuma Poemaro, Antaŭ Dumil Jaroj, En Ombro kaj Lumo, Paŭlo kaj Stefano, Voĉoj de la Poetoj de la Spiritisma Mondo, kaj Dicionario Esperanto-Português, de Ismael Gomes Braga, e a Biografia de Ismael Gomes Braga, de Zeus Wantuil, ela vende também o Esperanto Elementar de F.S.Almada. End.: Rua Marechal Deodoro, 11 – Santos (SP) CEP 11.100. Aceita reembolso Postal.

--------xxxxxxxx--------xxxxxxxx--------

## MONO RICEVITA

Ni ricevis kaj dankas el tuta koro, la

jenajn donacojn:

| | |
|---|---|
| Esperanto-Societo de Bauru. . . . | 90,00 |
| Eugenio José Gramignia . . . . . . | 100,00 |
| Elvira Fontes . . . . . . . . . . . . . . | 100,00 |
| Yolanda Araújo Costa . . . . . . . | 100,00 |
| Sumo . . . . . . . . . . | 390,00 |

-------xxxxxxxx-------xxxxxxxx-------

## 139-a DATREVENO DE SANTOS

Invitita de la urbestro de Santos, D-ro Antonio Manoel de Carvalho, ekslernanto de nia Prezidanto, por la solenaĵoj okazintaj en la 26-a de januaro pasinta, BKE gratulis tiun aŭtoritatulon pro la 139-a datreveno de nia urbo.

-------xxxxxxxx-------xxxxxxxx-------

## ENTIDADES QUE COMPÕEM O CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Como é do conhecimento de quase todos os brasileiros esperantistas, o Conselho Brasileiro de Esperanto foi criado com o fim de unir o movimento esperantista no âmbito nacional, e, para tanto 16 entidades deliberaram criar uma organização absolutamente neutra com a finalidade de unir num bloco forte as diversas sociedades existentes no Brasil, o que vem acontecendo, a pouco e pouco, graças à compreensão e reconhecimento da honestidade com que vimos lutando em prol da nossa causa. Entretanto, algumas organizações ainda não se uniram às que compõem o Conselho, o que, esperamos, seja feito em prol do nosso movimento. Cumpre salientar que o BKE é, em Brasília, o intermediário de todas as organizações que o compõem, prestando-lhes quaisquer serviços junto às autoridades federais, sem acarretar despesas para a interessada.

## SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

–" Lieĝo (Belgio) – Ni ricevis sciigon pri okazonta S.U.K., de S-ano Pál Felso, komisiito pri informado de S.U.K., kiun ni publikas nun: "S.U.K. – 1978 en Lieĝo-Studobjektoj: Astronomio, Psikologio kaj Internacia Literaturo.

Ĉijare oni okazigos la kvaran sesion de Someraj Universitataj Kursoj. Tiu ĉi esperantlingva faka aranĝo en 1978 konsistos el kursoj pri Astronomio, Psikologio kaj Internacia Literaturo. La 4-a sesio okazos en Lieĝo (Belgio), inter la 6-a kaj la 27-a de aŭgusto. Interesiĝantoj povas kontakti la jenan adreson: Someraj Universitataj Kursoj, PP 9, B-4000 – Liège X. Ĉi tie estas mendeblaj ankaŭ la kursotekstoj de la antaŭaj SUK-sesioj. Antaŭdankante la helpon kun estimo salutas vin: (Pál Felso) – komisiito pri informado de S.U.K."

-------xxxxxxxx-------xxxxxxxx-------

## ESPERANTO EN RADIO

Nia S-ano D-ro Carlos Lima Mello, el Alto Paraiso (GO), sendis al ni tre interesan sciigon pri radia komunikado: "Svisa Radio nun ankaŭ speciale direktas disaŭdigon al Sud-Ameriko per ondo 25.32m (11850 kHz) marde, ĵaŭde kaj sabate je la 21.35 GMT, t.e., de la 18.35 ĝis la 18.45, horo de Brazilio. Li informas, ke je la 21-a de januaro pasinta (sabate), tute hazarde kaj preskaŭ intuicie li ŝaltis la radion iom sencele kaj jen ĝuste sur la ondolongo de la esperanta programo en tre klara lingvo. Li invitas la instruistaron aŭdi tiun programon plej ofte, instigante samtempe la gelernantojn fari la samon, jen unika okazo por praktikadi Esperanton, kiel internacian aferon."